



E. ARMAND

LA ANTAŬVENANTOJ
DE
ANARKIISMO

Esperantigis : D.C.

SAT-Broŝurservo
F 47340 Laroque

1989 * 4 FF

Antikveco

Ni ne scias ekzakte - kaj kiuj dokumentoj povus nin informi ? - kiam komenciĝis la registara aŭ ŝtata aŭtoritato. Oni atribuis multajn kialojn al la establado de la aŭtoritato. Tial ke la homoj formis ĉiam pli multnombrajn grupojn, ĉu pruvigis necese konfidi la aferadministradon kaj la solvon de la kontestoj al la plej inteligentaj aŭ la plej timataj : sorĉistoj kaj pastroj ? Tial ke la primitivaj grupoj ĝenerale montriĝis malamikaj unuj kontraŭ la aliaj, ĉu trudigis la neceso centralizi la medio-defendon inter la manoj de pluraj aŭ de unu sola elektita inter la militistoj (la militistinoj) plej kuraĝaj aŭ plej bravaj ? Iel ajn estu, ŝajnas ke aŭtoritato ekzistis antaŭ la individua proprieto. Aŭtoritato evidente regis, dum la bienoj, la objektoj kaj, en iuj kazoj, la infanoj kaj la virinoj estis posedaĵo de la socia organizo. La reĝimo de la individua proprieto - t.e. la ebleco por membro de la kolektivo : 1-e akapari pli da grundo ol necese por sin vivteni kun sia familio ; 2-e ekspluatigi la pliaĵon pere de aliulo - nur rafinis, komplikis kaj igis pli tirana la aŭtoritaton ĉu teokratian ĉu esence militistan.

Ĉu la primitivuloj ribelis kontraŭ la aŭtoritato eĉ rudimenta, kiu severis en la primitivaj grupoj ? Ĉu estis objektantoj, malobeantoj en tiuj tempoj, kiam la klimataj fenomenoj estis atribuataj al superaj potencoj jen bonaj jen malfavoraj, kiam oni rilatigis la homokreadon al supernatura ento ? Iuj mitoj montras, ke la homo ne ĉiam bonvole akceptis esti ludilo en la mano de la dieco kaj sklavo de ties reprezentantoj, ekzemple la mito pri Satano kaj Prometeo, ribelaj anĝeloj kaj titanoj. Eĉ pli malfrue, kiam la registara kaj eklezia aŭtoritato estis firme starigita, okazis manifestacioj kiuj, kvankam restantaj en paca kadro, tamen atestis pri ribelemo. Oni povas klasifiki sub tiu ŝildo la satirajn scenojn kaj komediojn, la romanajn saturnaliojn, la kristanan karnavalon, ktp. Multaj fabeloj cirkulis inter la popolo, kiu ilin aŭdis ĉiam kun ĝojo iafoje

infaneca, en kiu la temo estis la sama : la venko de la malfortulo, de la subpremado, de la malriĉulo super la tirano aŭ la riĉulo.

La greka antikveco, kun Gorgio neanta ĉiujn dogmismojn ; kun Protagoro faranta la individuon mezuro de ĉiuj aferoj ; kun Aristipo, fondinto de la hedonisma skolo, por kiu ne estas alia bono ol la plezuro, la tuja aktuala plezuro, kio ajn estu ties origino ; kun la cinikuloj (Antisteno, Diogeno kaj Krateso) ; kun la stoikuloj (Zenono, Krizipo kaj ties sekvantoj), la greka antikveco naskis homojn kritikantajn, poste neantajn la ricevitajn valorojn.

Ekde la negado de la valoroj de la helena kulturo, la cinikuloj atingis al la negado de ties institucioj : geedzeco, patrio, proprieto, ŝtato. Malantaŭ la barelo kaj la lanterno de Diogeno, kuŝis io alia ol moko kaj spritvortoj. Sendube Diogeno traboris per siaj pikaj sarkasmoj la plej potencajn kaj la plej timatajn inter tiuj, kiuj elŝiris unuj el la aliaj la restaĵojn de la agonianta Ateno. Sendube Platono, skandalite de la ultrapopulara formo de liaj predikoj, lin nomis "iu delira Sokrato" ; sed rigardante la manlaboron egala al la intelektlaboro, proklamante sin mondcivitanoj, konsiderante la generalojn kiel "azenkondukistojn", igante ridindaj la popularajn superstiĉojn kaj eĉ la demonon de Sokrato, reduktante la vivobjekton al ekzercado kaj disvolvado de la morala persono, la cinikuloj povis sin pretendi, kiel sia mastro, animkuracistoj, heroldoj de libereco kaj vereco. Laŭ socia vidpunkto la cinikuloj estis komunecanoj, kaj tiu ilia principo ampleksis ne nur la aĵojn, sed ankaŭ la personojn, koncepto kara al diversaj filozofoj de la antikveco.

Oni riproĉis al la cinikuloj, kaj aparte al Diogeno, esti orgojlaj pro sia izoleco, pozi kiel modeloj, kaj troigi en sia vivmaniero, kiu estis kvazaŭa negado de ĉia organizita socio. Diogeno jam antaŭe respondis : "Mi estas sama, kiel la ĥorestroj, kiuj forcas la tonon por tiun alprenigi de la lernantoj."

La unua instruo de Zenono, tiu de la "Stoa", multe similis la instruon de la cinikuloj. Zenono, en sia "traktaĵo

pri la Respubliko" forpuŝis la morojn, la leĝojn, la sciencojn, la artojn, samtempe postulante, kiel Platono, la komuneco de la bienoj. La fundo de la stoika sistemo estas, ke la bono de l' homo estas la libereco, kaj ke la libereco oni konkeras nur per la libereco. Saĝulo estas sinonimo de libera homo : li ŝuldas sian bonon nur al si mem kaj dependas nur de si. Ŝirmita de la sortobatoj, en ĉio sensenta, sin reganta, bezonante nur sin mem, li trovas en si senlimajn serenecon, liberecon, feliĉon. Li ne plu estas homo. Li estas dio kaj pli ol dio, ĉar la feliĉo de la dioj estas privilegio de ties naturo, dum la feliĉo de la saĝulo estas konkero de sia libereco ! Zenono logike neis la ĉiopovecon, la kuratorecon de la ŝtato : la homo estu leĝo al si mem, kaj la individua harmonio naskiĝu el la harmonio kolektiva. Hedonismo, cinikismo kaj stoikismo starigis la "naturan rajton" por la individuo disponi pri si kontraŭ la "artefarita rajto", kiu faras el li instrumenton inter la manoj de la ŝtato. Zenono uzis tiun teorion por kontraŭbatali, kiel jam faris la cinikuloj, la troan naciismon de la Grekoj kaj por allasi socian instinkton, naturan instinkton instigantan la homon asociiĝi al aliaj homoj. Oni povas konsideri la cinikulojn kaj stoikistojn kiel la unuajn internaciistojn.

Mezepoko

Tiu ideo pri "natura rajto", "natura leĝo", "natura religio", estis alprenita de pluraj filozofoj. Cetere la triumfo de l' kristanismo ne estas tiel kompleta, kiel asertas ties incensiloportistoj. Multaj herezuloj tiam starigis kaj eĉ, pro singardo, sin kovras per la religia masko kaj trompkasas sian propagandon sub religia ŝeto.

Jen por ekzemplo la gnostikisto Karpokrateso de Aleksandrio, fondinto de la sekto de la Karpokratesanoj, kies filo Epifaneso kunigis la tutan doktrinon en sia verko "Peri Dikaïos Inés" (Pri justeco). Laŭ li, la dia justeco en la komuneco ekzistas en la egaleco (Koinonia met' Isotetos). Kiel la suno estas mezurita al neniu, same estu pri ĉiuj aĵoj, ĉiuj ĝuoj. Se Dio donis al ni la deziron, tio estas por ke ni ĝin kontentigu, ne por ĝin restrikti ; same, la aliaj vivantaĵoj ne bremsas sian apetiton.

La Karpokratesanoj estis inter la unuaj, kiuj agnoskis ĉies rajton super ĉiuj aĵoj, ĝis ties ekstremaj konsekvencoj, kaj provis ĝin praktiki. Ili estis laŭŝajne ekstermitaj. Tamen, surskriboj indikas ke, ankoraŭ en la VI-a jarcento, karpokratesaj tendencoj plu ekzistis en Cirenio, en Norda Afriko.

Ekstermitaj aŭ ne, la Karpokratesanoj havis sekvantojn. Ni ne scias, ĉu la incitoj de la sektoj adoptintaj iliajn konceptojn aŭ similajn ideojn forĵetis, interne de siaj grupoj, ĉian aŭtoritaton, ĉu ili ne estis "organizitaj" laŭ nuntempa stilo. Sed certe estas, ke la politika reĝimo reganta havis en ili nerepacigeblajn kontraŭulojn. Ekzistis internacioj el sekretaj societoj interrilataj, kies membroj, vojaĝante, estis frate akceptataj de la respondaj asocioj. Oni instruadis sekrete, kaj la multaj procesoj kontraŭ tiuj, kiuj estis malkovritaj kaj viktimiĝis de sia propagando, tion sufiĉe demonstras. Tre bedaŭrinde, iliaj veraj opinioj estas de ni nekonataj. Oni parolas nur pri tiaj krimoj (?) aŭ iliaj dekliniĝoj (?).

En la sinodo de Orleano (1022) dek unu kataristoj (Albigensoj) estas bruligitaj, ĉar akuzitaj praktiki la liberan amon. En 1030, en Montforto apud Torino, herezuloj estas akuzitaj, ke ili sin deklaris kontraŭ la religiaj ceremonioj kaj ritoj, ankaŭ kontraŭ la geedzeco, la murdo al animaloj, kaj favoraj al la komuneco de la bienoj. En 1052 en Goslar, ioma nombro de la herezuloj estis bruligitaj pro tio, ke ili sin deklaris kontraŭ la ekmortigo de ĉia vivantaĵo, t.e. kontraŭ la milito, la murdo kaj la ekmortigo de la bestoj. En 1213, Vaŭdanoj estis bruligitaj en Strasburgo pro tio, ke ili predikis liberan amon kaj komunecon de la bienoj. Temis ne pri "kleruloj", sed pri simplaj metiistoj : teksistoj, ŝuistoj, masonistoj, lignaĵistoj, ktp...

Sin apogante sur peco de la epistolo de Sankta Paŭlo al la Galatoj : "Se vi estas kondukataj de la spirito, vi ne plu estas sub la leĝo", multaj sektanoj lokis la homon, la personecon super la leĝo. Viroj kaj virinoj alprenis vidpunkton sufiĉe similan al tiu de la Karpokratesanoj kaj finatingis, en praktiko, al speco de libera komunismo, kiun ili travivis, kiel ili povis, en specoj de

kolonioj pli malpli okultaj kaj sub la minaco de senkompata subpremo. Amaŭro aŭ Amalriko el Bène apud Chartres instruis tiujn ideojn en Sorbono en la XII-a jarcento. Li havis disĉiplojn pli energiajn ol li, inter kiuj Ortliebo-n el Strasburgo ; tiuj konigis lian doktrinon anarki-panteisman en Germanio, kie ili trovis entuziasmajn kaj konvinkitajn partizanojn sub la nomo "Brüder und Schwestern des freien Geistes" (Fratoj kaj Fratinoj de la libera spirito), kiujn Max Beer, en sia "Historio de Socialismo", konsideras kiel anarki-individuistojn, sin tenantajn ekstere de la socio, de ties leĝoj, moroj kaj kutimoj, kaj kiujn kompense, la organigita socio senkompate kontraŭbatalis.

Iom imagu ! Por Amalriko el Bène kaj sekvantoj, Dio troviĝis en Jesuo samkiel en la paganaj pensuloj kaj poetoj, li parolis per la buŝo de Ovidio, samkiel per tiu de Sankta-Aŭgusteno. Tiaj homoj ne indis vivi !

En la herezoj endas distingi inter la panteismo-anarkiismo Amalrika, kies anoj sin konsideris eroj de la Sankta Spirito, forĵetante ĉian asketismon, ĉian moralan trudon, situante por tiel diri trans bono kaj malbono, - kaj la heredantoj de la maniĥeana agnostikismo kiel la Albigensoj, asketoj, kies aspiroj celis venkon super la materio. Sed ne ĉiam estas facile vidi la ekzaktan limon inter ili. La katolika historiisto Doellinger, kiu studis la historion de ĉiuj ĉi sektoj, ne hezitis diri ke, se ili estus venkintaj (temis precipe pri la Vaŭdanoj kaj Albigensoj), rezultus de tio ĝenerala renverso kaj kompleta reveno al la paganaj barbareco kaj sendisciplino.

Al la unua grupo panteista-anarkiista ni religas la antverpenan herezon de "Tanchelin", tiun de la "Kloeffers" de Flandrio, de la Pikardoj aŭ Adamuloj (radiantaj ĝis Bohemio), de la "loistoj" ankaŭ antverpenaj ; ĉie-stariĝas homoj aŭ asocioj, kiuj volas reagi kontraŭ la superrega sistemo, reprezentita precipe de la katolikismo, kies alt-ranguloj havis skandalan konduton, plutenis la prostituadon, regis bordelojn kaj ludodomojn, estis armitaj kaj batalis kiel profesiaj militistoj.

Mi absolute samopinias kiel Max Nettlau, laŭ kiu, en la lastaj jaroj de la Mezepoko, Sudfrancio, Albigenlando, parto de Germanio ĝis Bohemio, la regionoj trafluataj de

la malsupra Rejno ĝis Nederlando kaj en Flandrio, iuj partoj de Anglio kaj Italio, fine Katalunio, konsistigis elektan terenon por la sektoj, kiuj atakis la geedzecon, la familion, la proprieton kaj altiris al si senkompatan subpremon.

Ne nur en Eŭropo disvolviĝis anti-aŭtoritataj movadoj. En la historio de Armenio, de Tschamtschiang (Venecio 1795), temas pri iu persa herezulo kun nomo Mduŝik, kiu neis "ĉian leĝon kaj ĉian aŭtoritaton"... La Literatura Suplemento de la "Novaj Tempoĵ" (Temps Nouveaux, Paris, vol.II, p.556-57) enhavas artikolon titolitan "Unu antaŭvenanto anarkiista", en kiu la turka D-ro Abdullah Djevdet prezentas sirian poeton de la XV-a jarcento : Ebr-Ala-el Muarri.

Renesanco

Aliras ni la Renesancon ; ne eblas nei, ke la katolikoj helpataj de la sekulara ŝtato, nenigis kaj reduktis al senpoveco la panteistajn-anarkiistajn herezulojn. La protestantoj ne sin montris indulgaj al la anabaptistoj, speco de aŭtoritataj komunistoj sin apogantaj sur la Malnova Testamento. La diktaturo de Jan de Leyde en Munster fulmrapide pasis. La malnova mondo devis klini la kapon sub la ĉiopoveco de la ŝtato pli forte servata kaj centralizita ol en la Mezepoko. La malkovro de Ameriko tamen flamigis la spiriton de la pensuloj kaj originaluloj, kies mensostato ne estis dispremita sub la laminatilo de la politika organizado. Oni parolis pri feliĉaj insuloj, pri Eldoradoj, Arkaidoj. En sia "Kosmographie" (1544) Sebastian Münster priskribis la loĝantojn de la "novaj insuloj", "kie oni vivas libera je ĉia aŭtoritato, kie oni konas nek la juston nek la maljuston, kie oni ne punas la misfarulojn, kie la gepatroj ne superregas siajn infanojn. Nenia leĝo, libereco de la seksaj rilatoj. Neniu spuro de iu Dio, nek de iu bapto, nek de iu kulto." Al tiuj aspiroj de libereco oni eble ligu la aperon de la Framasonismo kaj de la diferencaj ordenoj el iluminitoj. Unu el la plej brilaj genioj de la Renesanco, Francisko Rabelezo kun sia Abatejo de Thélème (Gargantuo I. 52/57) povas esti egale konsiderata kiel unu el la antaŭvenantoj de anarkiismo. Elizeo Reclus lin proklamis "nia granda praulo". Certe en la priskribo de tiu libereca medio, li neglektis la ekono-

mian flankon kaj li inklinis al sia jarcento pli ol li imagis mem. Certe, sian rafinitan biendomon li pentris kun la sama spirito, kiel Tomaso More, en sia "Utopio", sian idealigitan Anglion, kaj kiel Campanella, en sia "Civito de l' Suno", sian italan kaj teokratian respublikon, aŭ kiel la aŭtoro de "Reĝlando de Antangil" (la unua franca utopio, 1516) sian protestantan konstitucian monarkion. Tio ne malhelpas, ke plaĉis al Rabelezo, en la Abatejo de Thélème, pentri vivon **senaŭtoritatan**. Oni memoras, ke Gargantuo ne volis konstrui "muregojn ĉe la ĉirkaŭo". "Eĉ, kaj ne sen kaŭzo, aprobis la monako, kie muro estas antaŭ kaj malantaŭ, estas multe da murmuro, envio kaj muta konspiro"... La du seksoj ne sin tenis senmove kaj senparole... "tiela simpatio estis inter viroj kaj virinoj, ke ĉiutage ili estis vestitaj per simila ornamaĵo..."

"Ilia tuta vivo estis okupita ne per leĝoj, statutoj aŭ reguloj, sed laŭ ilia bonvolo aŭ libera arbitro ; ili ellitiĝis, kiam plaĉis al ili ; ili trinkis, manĝis, laboris, dormis, kiam ili sentis por tio deziron. Neniu ilin vekis, neniu perforte devigis ilin trinki, manĝi, aŭ fari ion ajn. Tiel establis la aferon Gargantuo. Kaj ilia regulo estis nur tiu klaŭzo : "faru kion ci volas", ĉar liberaj homoj, bone naskitaj, bone instruitaj, konversaciante kun honestaj kompanoj, nature havas instinkton kaj pikilon, kiuj puŝas ilin al virtaj faroj, kaj fortiras de malvirto, kiun ili nomis honoro. Tiu, kiam pro triviala regateco kaj trudado, estas deprimataj kaj submetitaj, deturnas la noblan inklinton per kiu ili sincere emis al virtoj, kaj demetis kaj forĵetis tiun servutecan jugon : ĉar ni ĉiam entreprenas malpermesitajn aferojn, kaj avidas tion, kio estas al ni rifuzita... Per tiu libereco, ili eniĝis en laŭdindan konkuremon por fari ĉion, kio plaĉis al unu sola. Se iu diris : "Ni trinku", ĉiuj trinkis, se diris : "Ni ludu", ĉiuj ludis. Se diris : "Ni iru al kampaj petoloj", ĉiuj tien iris..."

Rabelezo estis pliverdire utopiano. Alia antaŭanto - kaj fama - de anarkio estas nekontraŭdireble La Boétie (La Boesi) en sia "Kontraŭ unu" aŭ "Pri memvola servuto" (1577), kies ĉefa ideo estas la rifuzo kontraŭmetenda al la servo de l' tirano, kies potenco fontas el la memvola servuto de la homoj. "Eliĝante el eta fajrero, la fajro altiĝas kaj des pli vigliĝas, ju pli ĝi trovas lignon. Por

estingi ĝin, ne necesas ĵeti akvon, sufiĉas, ke oni ne plu metu lignon ; tiam, dispanante nenion konsumotan, ĝi konsumiĝas, perdas sian tutan viklecon kaj ne plu estas fajro. Same pri la tiranoj : ju pli oni donas kaj servas al ili, des pli ili gajnas novajn fortojn por ĉion neniigi kaj detrui. Male, se oni nenion donas al ili, se oni ne obeas ilin, sen bato, sen batalo, ili restas nudaj kaj venkitaj, kaj neniĝas ; samkiel radiko, kiu sen suko, sen nutraĵo, sekigās kaj mortas." "Firme decidu ne plu servuti, kaj jen vi liberaj."

La Boesi ne rekomendas socian organizadon difinitan. Tamen li parolas pri la naturo, kiu faris ĉiujn homojn samforme kaj laŭŝajne sammuldile... "ĝi ne sendis tien la plej fortajn nek la plej prudentajn kiel armitajn rabistojn en arbaron por malmilde trakti la malfortulojn. Prefere kredu, ke, atribuante pli al unuj malpli al aliaj, ĝi celis instigi al frata amo inter unuj helpokapablaj kaj aliaj helpobezonantaj. Se do tiu bona patrino donis al ni ĉiuj la tutan terglobon kiel loĝejon, loĝigis nin ĉiujn en iel sama domo, kreis nin ĉiujn el sama pasto por ke ĉiu povu sin rigardi, preskaŭ rekoni en la alia kvazaŭ en spegulo ; - se ĝi donis al ni ĉiuj komune tiun altvalorajon, la voĉon, la parolkapablon, por ke ni pli interrilatu kaj interfratiĝu, por ke la reciproka eldirado de niaj pensoj konduku al komuna volo ; - se ĝi ĉiel strebadis tiel forte streĉi la kunligon de nia socio kaj alianco ; - se ĝi ĉiel evidentigis sian volon fari nin ĉiujn ne ligitaj, sed unu ; - ni ne dubu, ke ni estas nature liberaj, ĉar ni estas kunuloj ; kiu do povus imagi, ke Naturo, kuniginte nin ĉiujn, servutigu iun ?" El tio oni povus dedukti tutan socian sistemon. (*)

(*) La citaĵoj de La Boesi estas eltiritaj el la traduko de ROL (Memoroj Servuti).

La monarkio fariĝas pli kaj pli absoluta. Ludoviko la XIV-a reduktas la duonon de la "intelekt" al stato de servisteco, kaj devigas la alian duonon sin turni al la nederlandaj presejoj. En "La sapiroj de la sklaveca Francio, kiu aspiras al libereco" (1689-1690) kaj similaj verkoj aperintaj en Amsterdamo, oni trovas malmulte da anarkiismo. Oni devas atendi Dideroton por aŭdi tiun frazon, kiu sufiĉas por esprimi la tutan an-arkiismon: "Mi volas nek doni nek ricevi leĝojn." En sia interparolo de patro kun siaj infanoj (Kompleta Verkaro, vol.V, p.301) li donis antaŭecon al la homo de l' naturo super la homo de l'leĝo, al la homa racio super tiu de la leĝodonanto. Ĉiuj memoras la frazon de la Marŝalino en "Interparolo de Filozofoj kun la Marŝalino": "La malbono estas tio, kio havas pli da domaĝoj ol da avantaĝoj; la bono, male, kio havas pli da avantaĝoj ol da domaĝoj." Kaj la adiaŭoj de la maljunulo en la "Suplemento al la vojaĝo de Bougainville": "Vi estas du infanoj de l' naturo: kiun rajton ci havas super li, kiun li ne havas super ci?" - Stirner, pli poste, ne parolos pli ĝuste.

En la "Socialista Revuo" de septembro 1888, Benoît Malon dediĉas dekon da paĝoj al Don Deschamps, benediktano de la XVIII-a jarcento, antaŭvenanto de la Hegelismo, Transformismo kaj anarkiisma komunismo.

Jen fine Sylvain Maréchal, poeto, verkisto, bibliotekisto (1750-1803), kiu la unua ĝoje proklamis anarkiismajn ideojn, tamen makulitajn de arkadiismo: Sylvain Maréchal estis poliverkisto, kiu traktis ĉiuspecajn studobjektojn: "Ŝafisto-poemoj-n" (1770) kaj "Anakreonaj-n kantoj-n" en 1779; li sukcesas aperigi pecojn el "Morala Poemo pri Dio", "La Moderna Pibrac", en 1781; en 1782 "La ora tempaĝo", paŝtista fabelaro; en 1784 "Libro eskapinta el diluvo" aŭ "Psalmoj freŝdate malkovritaj". En 1788, subbibliotekisto, ĉe la Mazarina Biblioteko, li publikigas sian "Almanako-n de la Honestuloj", en kiu li anstataŭigis la nomojn de la sanktuloj per tiuj de famaj viroj kaj virinoj: li lokis Jesuon Kriston inter Epikuro kaj Ninon de Lenclos. Tial, tiu almanako estis kondamnita al bruligo per la mano de la ekzekutisto, kaj ĝia aŭtoro enkarcerigita en Sankta-

Lazaro (*), kie li restadis kvar monatojn. En 1788 aperas liaj "Modernaj apologoj por la Kronprinco". En ili troviĝas la historio de reĝo, kiu, sekve de kataklismo, resendadas hejmen ĉiun el siaj submetitoj, ordonante ke, de nun, ĉiu familiestro estu reĝo en sia hejmo. En tiu verko estas formulita la principo pri "ĝenerala striko" kiel rimedo por starigi socion, en kiu la Tero estos komuna posedaĵo de ĉiuj siaj loĝantoj, kie regas "libereco, egaleco, paco kaj senpekeco". En "La triumfanta tirano" li imagas popolon, kiu cedas la urbojn al la soldatobando kaj rifuĝas en la montaro kie, dividita en familiojn, ĝi vivas sen alia mastro ol la naturo, sen alia reĝo ol siaj patriarkoj, por ĉiam rezignante la restadon en la civitoj de ĝi koste konstruitaj, kies ĉiu ŝtono estis priverŝita de ĝiaj larmoj, kolorigita de ĝia sango. La soldatoj senditaj por rekonduki la homojn en ties domaregojn konvertiĝas al libereco, kaj restas kun tiuj, kiujn ili devis denove servutigi, resendadas siajn uniformojn al la tirano, kiu mortas pro furiozo kaj malsato, vorante sin mem. Tio nekontraŭdir-eble estas rememoro de "Memvola Servuto".

En 1790, li eldonas "Almanako-n de la honestaj virinoj" ornamitan per satira gravuraĵo pri la dukino de Polignac. Troigante la "Almanako-n de la honestuloj", li anstataŭigas ĉiun sanktulon per konata virino. Tiuj famaj virinoj estas dividitaj en 12 klasojn laŭ sia "ĝenro" (1 klaso por 1 monato) : Januaro, Lesbaninoj ; Februaro, Traktistinoj, ktp... (...) Tiun tre raran broŝuron oni trovas nur en la infero de la Nacia Biblioteko.

Sylvain Maréchal nur kun rezervo akceptis la revolucion de 1789. La unua anarkiista franca gazeto "La hom-amanto" (1841) asertas, ke li diris ke, tiom longe dum ekzistos mastroj kaj sklavoj, malriĉuloj kaj riĉuloj, estos nek libereco nek egaleco.

Sylvain Maréchal pluaperigas siajn verkojn : en 1791, "Damo Naturo antaŭ la Nacia Asembleo" ; en la jaro II-a "La lasta juĝo de la reĝoj" ; en 1794, "la festo de la raciō". Li kunlaboras en "Revolucioj de Parizo", "La Amiko de la Revolucio", "Bulteno de la Amikoj de Verō". La

(*) Prizonō en Francio.

hebertisto Chaumette, lia amiko, viktimiĝas de la Teroro, sed Sylvain Maréchal eskapas al Robespierre ; li same eskapos al la termidora reakcio kaj al la persekutoj de la Direktorio, kvankam li kunlaboris en la "Manifesto de la Egaluloj", oni almenaŭ asertas tion.

Kiam finita la ŝtormego, Maréchal reprenas la plumon. En 1798 aperas lia "Kulto kaj leĝoj de socio el homoj sen Dio". En 1799, "La vojaĝoj de Pitagoro" en ses volumoj. En 1800, lia granda verko "Vortaro de la malnovaj kaj modernaj Ateistoj", kies suplementon verkis astronomo Jérôme Lalande. Fine, en 1807, "Pri la Virto", postmorta verko, kiu estis eble presita, sed ne aperis, kaj kiun Lalande uzis por la dua suplemento al la "Vortaro de la Ateistoj". Cetere, Napoleono malpermesis al la fama astronomo pli longtempe pluskribi pri ateismo.

*

**

En Anglio, oni povas ĝis ia grado konsideri Winstanley kaj ties nivelistojn kiel antaŭvenantojn de anarkiismo. John Lilburne, alia nivelisto, denunciis aŭtoritaton "sub ĉiuj ĝiaj formoj kaj aspektoj" ; ne plu estis kalkuleblaj liaj kondamnoj al monpunoj kaj jaroj da prizono. Oni lin ekzilis en Nederlando. Tri fojojn la juĝantaro lin absolvis, lastfoje en 1613 (li estis malobservinta la elpeljuĝon), Cromvelo lin plutenis en kaptiteco "por la bono de la lando" ; en 1656 oni liberigis lin fariĝintan kvakeron, kio ne malhelpis, ke, en 1657, 39-jara, li mortis pro rapidevolua ftizo.

Ĉirkaŭ 1650, oni parolas pri Roger Williams, kiu debutis kiel guberniestro de la teritorio, kiu pli poste formis la Ŝtaton de Rod-Insulo (Usono), kaj precipe pri unu el liaj partizanoj, William Harris, kiu tondre parolis kontraŭ la senmoraleco de ĉiuj teraj povoj, kaj la krimo de ĉiuj punkorektoj. Ĉu temas pri mistika viziulo aŭ pri izolita anarkiisto ? La unuaj kvakeroj estis ankaŭ firme kontraŭŝtataj.

La Nederlandano Peter Cornelius Hockboy (1658), la Anglo John Bellers (1695), la Skoto Robert Wallace (1761) sin deklaras por memvola kaj kooperanta socialismo. En siaj "Prospects" Robert Wallace konceptis homaron kon-

sistantan el multaj aŭtonomaj distriktoj. La protesto kontraŭ la registaraj kaj aŭtoritataj ekscesoj aperas en ĉiuj specaj pamfletoj kaj satiroj akregaj kaj malkaŝemaj, pri kiuj oni hodiaŭ ne plu havas ekzemplojn. Sufiĉas citi la nomojn de Thomas Hobbes, John Toland, John Wilkes, Swift, De Foe.

Ni parolu nun pri la Irlandano Edmond Burke kaj ties "Vindication of Natural Society" (1756) - pravigo de la natura socio - kies fundamenta ideo estas jena : ia ajn estu la formo de registaro, neniu estas pli bona ol alia. "La diversaj specoj de registaroj reciproke rivalas koncerne la absurdecon de iliaj konstitucioj kaj la subpremon, kiun ili suferigas al siaj regatoj... Eĉ la liberaj registaroj spertis pli da konfuzo kaj kulpis pli da nekontesteble tiranaj agoj ol la plej despotaj registaroj en la historio." Edmond Burke ŝanĝis siajn dirojn. En siaj "Pripensoj" li starigis kontraŭ la franca Revolucio. Iu Usonano, Paine, deputito ĉe la Konvencio, respondis al li per "The Rights of Man" (1791-92) - la rajtoj de l'Homo. Ĉar li oponis al la ekzekuto de Ludoviko la XVI-a, li estis forĵetita en prizanon. Li malfacile eskapis la gilotinan. Li profitis sian restadon en karcero por verki "La prudenta Tempaĝo" - The Age of Reason (1795). "Je ĉiuj ŝtupoj la socio estas bonaĵo, sed eĉ sub sia plej bona aspekto, la registaro estas nur necesa malbono ; sub sia plej malbona aspekto ĝi estas netolerebla malbono... La metio de registaro ĉiam estis monopoligita de la plej nesciantaj kaj plej friponaj el la individuoj de la homaro." En 1796, aperas en Oksfordo broŝuro titolita : "The inherent Evils of all State Government demonstrated" - "Demonstro de la malbonoj esence propraj al ĉia ŝtata registaro", - atribuita al A.C. Cuddon, forte individuism-anarkiema, kiun Benj. R. Tucker reeldonis en 1885 en Bostono.

Sub influo de la Revolucio kreiĝis en Londono grupo nomita "Pantisocracy", impulsita de juna poeto Southey, kiu pli poste laŭ ekzemplo de Burke forneis siajn junecajn revojn. Laŭ Sylvain Maréchal - parte konfirmita de Lordo Bajrono - tiu epikura grupo volis realigi la abatejon de Thélème, kaj komunigi inter siaj membroj ĉiujn aferojn, eĉ la seksajn ĝuojn. Ĉiam laŭ Maréchal, la plej grandaj artistoj, la plej grandaj scienculoj, la plej famaj homoj en

Anglio, estis membroj de tiu grupo, kiu fine estis disigita per unu "Bill" de la Parlamento ("Vortaro de la Ateistoj", ĉe la vorto : Thélème).

En siaj "Figuroj de Anglio" Manuel Devaldès prezentas "La Pantisokratio kiel projekton de kolonio establota en Usono inter la Ilinojsanoj, kolonio bazata sur la ekonomia egaleco. Du horoj da ĉiutaga laboro devus sufiĉi por la nutrado kaj vivteno de la kolonianoj. Laŭŝajne, sekve de la forlaso de Southey kaj la morto de du el la precipaj iniciatintoj, la "Pantisokratio" laŭdire mortis antaŭ ol naskiĝi.

En Germanio, Šillero verkis "La Rabistoj-n", kies ĉefa rolulo, Karl Moor, stariĝis kontraŭ la konvencioj, kontraŭ la leĝo, kiu neniam kreis superan homon, dum la libereco generis kolosojn kaj supervalorajn homojn. Fichte diris ke, se la homaro estus morale perfekta, ĝi ne bezonus ŝtaton ; Wilhelm de Humboldt, en 1792, defendis la tezon de la redukto de la ŝtato al ties minimuma funkcio ; Alfieri en Italio verkis "Pri la Tiraneco".

Ĉiuflanke, sub formo aŭ alia, la aŭtoritato estis senĉese atakata. Spinozo, Comenius, Vico, Voltero, Lessing, Herder, Condorcet, estis liberecanoj laŭ iaj punktoj, iaj formoj de sia literatura aktiveco. Batalante kontraŭ la torturoj puntruditaj al la sorĉistoj, kontraŭ la severegaj punkorektaĵoj de la deliktoj, kontraŭ la sklaveco - por la liberigo de la virino - por alia edukado de la infano - kontraŭ la religia superstiĉo kaj por la materiismo : Spee, Thomasius, Beccaria, Sonnenfelds, John Howard, Clarkson, Mary Wollstonecraft, Rousseau, Pestalozzi, La Mettrie, d'Holbach, subfosis la subtenilojn de la aŭtoritato. Necesus unu volumo por rememorigi la nomojn de tiuj, kiuj, iel aŭ aliel, kontribuis al ŝancelado de la fido al la Ŝtato kaj Eklezio.

Tial ni finos per William Godwin, kiun, pro lia "Enketo pri la politika justico kaj ties influo sur la virto kaj la feliĉo ĝenerale" (1793), ni konsideras kiel la unuan inda je la nomo doktrinulo pri anarkiismo. Estas ja vere, ke Godwin estas komunist-anarkiista, sed lia neado de la leĝo kaj ŝtato konvenas al ĉiuj nuancoj de anarkiismo.

El "Kio estas Anarkiisto?" de E. Armand

... Oni kutime ligas historie la anarkion al la laborista movado, kiu sub nomo Internacio floradis fine de la reĝado de Napoleono la III-a. Tio malĝustas. La malamono kaj la insultoj, per kiuj Karlo Marks, la granda profeto de la scienca socialismo, persekutadis Mikaelon Bakunin, ne kaŭzis profundaj malakordoj intelektaj aŭ etikaj. Bakunin kaj ties amikoj estis forpelitaj de la Internacio, ĉar federalistoj, malcentralizemaj, insurekciemaj, malamikaj al la formo de ŝtatisma konkero per la parlamentaj seĝoj, kiun estis alprenonta la socialista agado. La amikoj de Bakunin, la federalistoj, proklamis sin kolektivistoj kaj iuj inter ili hodiaŭ riproĉas al la socialismo, ke ĝi akaparitis tiun kvalifikon ; ja federalistoj tradukis kaj disvastigis en la mediteraneaj landoj "la **Kapitalo**"-n, la ĉefan verkon de Marks. Certe, Bakunin estis anarkiemulo, ofte perforteme kaj foje profunde, sed se oni zorge studas la movadon de la ĵurasa federacio (kaj foras de ni la penso mistaksi la agadon, kiun ĝi siatempe plenumis), oni en ĝi renkontos ĉiujn reaperojn de la iama socialismo : kredo je la egaleco, la frateco inter ĉiuj homoj ; ideoj pri universalaj solidaro kaj amo, pri estonta socio, pri revolucio savonta kaj tuj transformanta la homaron - konceptoj, kiujn la anarkiismo, kiel la aliajn, submetiĝas al la individua analizo kaj kiuj estas neniel specife anarkiismaj. Verdire, la federalistoj de la Internacio montriĝis anarkiemaj en la koncepto pri la taktiko kaj la organizado de la socialisma movado. Por la cetero, nenio diferencigis ilin de la tiamaj revoluciaj socialistoj.

Situante ekstere, eksterpartiaj, specoj de perditaj infanoj, vivantaj antitezoj de la socialismo, la anarkiistoj malakordas sur ĉiuj punktoj kun la nuna socio. (...)

Ĉar ĝi lokiĝas trans la kutimaj reguloj, trans la aŭtoritatoj, kiuj ilin regas, la anarkiismo ne estas nura doktrino, nura sinteno, ĝi estas **vivo**. Ĝi ne estas sistemo, kolekto el preskriboj, malfekunda filozofio, ĝi estas konstanta aplikado, realigado, **aktivado** ĉiutage !

La anarkiisto negas la leĝon, stariĝas kontraŭ la aŭtoritato de ties reprezentantoj, kontraŭ la agoj de la plenumantoj de la socio, tial ĉar li asertas kapabli doni mem leĝon al si kaj trovi en si la forton necesan por ekzisti kaj konduti, tio sen ekstera interveno, ankaŭ sen kompromitiĝo. Li konceptas neniujn aliajn societojn, ol asociojn el kamaradoj unuiĝintaj per komuna akordo kaj libera laboro. La societoj, en kiuj li vivas, bezonas, por pludaŭri, mil specujn de aŭtoritatoj : aŭtoritato de

dio, aŭtoritato de leĝdonantoj, aŭtoritato de la riĉeco, de la konsiderindeco, de la respektindeco, de la prapatroj, de ĉiuspecaj programoj. La anarkiisto, elvokante sin mem, ekzamenas, konsideras ĉiujn aferojn, akceptas aŭ forĵetas laŭ tio, ĉu la proponataj aŭ prezentataj ideoj kongruas aŭ ne kun lia vivkoncepto aŭ kun liaj individuaj aspiroj. Ĉiuj homoj akceptas esti determinataj de sia medio ; strebas la anarkiisto - kalkulante kun la neeviteblaj fizikaj kondiĉoj - unue sin determini mem, poste roli kiel **determinanto** de l' medio.

Konklude, la anarkiistoj prezentas al si :

a) homan idealon : la **anarkiiston** ; la homaran unuecon neganta la aŭtoritaton kaj ties ekonomian korolarion : la ekspluatadon ; la estulon, kies vivo konsistas el daŭra reagado kontraŭ medio, kiu nek povas nek volas lin kompreni aŭ lin aprobi, tial ĉar la konsistigaj eroj de tiu medio estas sklavoĵoj de malklero, de apatio, de prapatraj difektoj, de la respekto al la establitaj aferoj ;

b) moralan idealon : la **konscian individuon**, emancipiĝontan, sur la vojo al realigado de nova tipo : la homo sen dioj kaj sen mastroj, sen fido kaj sen leĝo, kiu sentas neniam bezonon pri reglamentado aŭ ekstera trudo, tial ĉar li posedas sufiĉe da volkapablo por determini siajn proprajn bezonojn, uzi siajn pasiojn por pli disvolviĝi, multigi la eksperimentojn de sia vivo kaj konservi sian individuon ekvilibron ;

c) socialan idealon : la **anarkiistan medion**, socion, en kiu la homoj - izolitaj aŭ asociitaj - determinus sian individuon vivon, en siaj aspektoj intelekta, etika, ekonomia, per libere interkonsentita kaj aplikata akordo, bazita sur "reciprokeco", atentante pri la libero de ĉiuj, bridante la liberon de neniu.

(trad. Kribo)

De E. ARMAND, ĉe SAT-Broŝurservo :

**Nia individuismo,
ĝiaj depostuloj kaj tezoj
per demandoj kaj respondoj**

(esperantigis D.C.)

24 paĝoj, 4 FF

Presita de : C.Baudé, F 47340 Laroque Timbaut
por : Amika Esperanto-Rondo Aĝenia, F 47340 Laroque